

REVUE

FRANÇAISE

D'ESPERANTO

FRANCA ESPERANTISTO

Fondée en 1908 - 37^e année - 3^e série - N° 257 - MARS - AVRIL 1969



Strasburgo invitas vin

Junulara renkontiĝo okazos de la 4a ĝis la 12a-IV-69, en la junular-gastejo de Kehl, sub la temo "Kion deziras la nuna Junularo?"

Speciala Poŝtstampo aperos kun franca teksto. La stampilo estos uzata en kongreseja poŝtoficejo, sabaton kaj dimanĉon de la 9-12 kaj 14-18 h.

Kampadejoj - Vidu R.F.E. n°256 p.17a

KVINA BULTENO

Honora Komitato - Akceptis la membrecon Prof. D-ro H. FULER, vic-prezidanto de la Eŭropa Parlamento, S-roj A. POHER, prezidanto de la Senato, E. FAURE, ministro pri Edukado kaj M. GENEVOIX, membro de la Franca Akademio.

Kongresejo - Domo de la Fakultato pri Literaturo kaj Humanaj Sciencoj, 25, rue du Soleil - (aŭtobusoj n°20 haltejo Soleil aŭ n°42 haltejo Placo de Athènes).

Informejo - En la pavilonoj de la Turisma Oficejo: a) antaŭ la ĉefstacidomo; b) je la franca flanko de la Eŭropa (Kehl) Ponto.

Programo: Ĉiuj membroj, kiuj aliĝis al la kongreso ricevis la detalitan programon, el kiu vi legos kelkajn erojn ĉi-sube:

Vendredon 4/4 - Ek de la 16h akcepto de la kongresanoj; 19h30-20h30 - en la kongreseja vestiblo - interkonarrendevuo de la kongresanoj.

Sabaton 5/4 - 9h-12h: kunsidoj de la estraroj, konsilantaroj, laborkunsidoj de fakaj organizaĵoj (instruistoj, KELI, filatelistoj, fervojistoj, Germana Esperanto-Instituto, ktp..).

Dume, okazos promonadoj per ŝipo al Strasburgaj vidindaĵoj.

De la 17h30-18h30, estos la Horo de la Libroj, dum kiu la ĉeestantoj estos petataj aĉeti multajn librojn.

Vespere, je la 19h45 aŭtobusa ek-

FRANCA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE U.F.E. (Unuiĝo Franca por Esperanto)

34, Rue de Chabrol, Paris X^e - C.C.P. 855-35 Paris

ABONNEMENT ANNUEL : 30 Francs. — Le Numéro : 3 Francs (CCP 855-35 PARIS)

Rédaction provisoire :

J.-A. ROUSSEAU

U.F.E., 34, rue de Chabrol
PARIS (10^e)

Les textes à publier doivent être toujours dactylographiés avec double marge et double interligne.

Prière d'envoyer des clichés et non de simples photographies.

Les manuscrits non insérés ne sont pas renvoyés.

Joindre 0,80 F. en timbres pour tout changement d'adresse.

BUREAU DE L'U.F.E. :

Président :

Dr André ALBAULT, 32, av. E.-Billières, 31 - TOULOUSE - 03.

Vice-présidents :

Gabriel ROUGETET (Relations extérieures, statuts), 71 ter, avenue Foch, 78 - SAINT-GERMAIN-EN-LAYE.

THIERRY Jean (affaires culturelles, enseignement extra scolaire), 5, rue Léon-Cogniet, 75 - PARIS-17^e.

J. GUILLAUME (relations avec l'U.E.A., secrétariat administratif), 8, rue Camille-Saulnier, 78 - Le VESINET.

F. BOYET (G.E.E., enseignement dans les écoles), 3, rue Lebas, 49 - ANGERS.

Secrétaire Général :

André BOURDEAUX (affaires générales, information, relations avec la presse, Espéranto-Actualités), chez U.F.E., 34, rue de Chabrol PARIS 10^e

Secrétaire général adjoint :

Mme BALLAVEN (affaires générales), 18, avenue de Villiers, 75 - PARIS (17^e)

Secrétaire chargé des finances :

Pierre ROYER, 37, avenue du Pt-Kennedy, 91 - MASSY.

Trésorier :

J.A. ROUSSEAU, 64, avenue J.-Moulin, 75 - PARIS (14^e).

veturo al Kehl, kie okazos la Bankedo (gastejo Barbarossa).

Dimanĉon 6/4: Je la 8h.30 okazos diservoj en la preĝejo St-Etienne kaj la Luterana Preĝejo St-Pierre-le-Jeune.

10h30 - 12h30: Kongresa solenaĵo sub la ĉeftemo: ESPERANTO POR EUROPO;

12h15 : Komuna Fotografado - 14h30/18h: Jarĉefkunvenoj de G.E.A. kaj U.F.E. - 20h/22h30: Varieteaj prezentadoj kaj Folkloraj Dancoj - Poste okazos la Balo.

Lundon 7/4: 9h/12h: Kunsidoj de la UEA-delegitoj: prelego franca-germana pri la "infiluo de J.-J Rousseau sur la eŭropa edukado" - 14h/18h: Ekskurso al la Vogezoj kaj la Alzaco Vinstrato. Dume okazos perŝipa promenado al la Strasburgaj vidindaĵoj kaj ankaŭ kunsido de la estraro de UFE. Je la 18hoo, adiaŭa rendevuo en la Kongreseja vestiblo.

Mardon 8/4: 9h30: Ekveturo por la aŭtobuse ekskurso al Norda Alzaco kaj Nigra Arbaro, tra Niederbronn-les-Bains, Baden-Baden, Oberkirch kaj Kehl.

Lastaj konsiloj: NEPRE kunportu vian pasporton, aŭ vian nacian legitimaĵon bezonotaj por eniri en Germanujon.

Ĉiam havu vian kongreskarton por eniri en la kongresejon (se la kongreso estus ĝenata de manifestantoj!).

OFICIALA KOMUNIKO DE U.F.E...OFICIALA KOMUNIKO D

Estas necese memorigi al niaj membroj la decidon de Calais (1967) pri la pago de la kotizoj.

La membroj, kiuj aliĝas al Esperanto - Grupo devas pagi siajn kotizojn al la grupa kasisto; la izoluloj devas pagi al la Federacia kasisto.

Ankoraŭ tro multe da membroj sendas rekte al U.F.E. siajn kotizojn. Tio malrapidigas ilian enskribiĝon, ĉar la kasisto de UFE ĉiam resendat la tutan kotizon al la Federacia kasisto: duoble nenecesa laboro.

22/91

En nia malgranda vilaĝo (850 enloĝantoj), ni instruis, dum multaj jaroj laŭ la Freinet-pedagogio, per libere verkitaj tekstoj, gazeto presita de la lernantoj-mem, abunda interlerneja korespondado kaj interŝangaj vojaĝoj.

De naŭ jaroj, ni instruas Esperanton laŭ la samaj teknikoj. Ĉiujare ni partoprenas en la internacia gazeto "Grajnoj en Vento"; ni havas komunan korespondadon de grupo al grupo; kaj personajn korespondadojn inter gelernantoj el Ĉeĥoslovakio, Pollando, Suomio, Bulgario, Jugoslavio, Germanujo, Anglujo, Hungario, Nov-Zelando, k.t.p...

Dum decembro 1967, la Koresponda Servo de U.E.A. indikis al ni adreson de dana lernejo, kiu serĉis "kollektivon klaskorespondadon, kies celo estas ne nur korespondi, sed ankaŭ interŝangi vizitojn".

Kompreneble, la indikita celo allogis nin ĉiujn - gelernantojn kaj geinstruistojn. Dum la lernejjaro, la gvidantoj interŝangis multajn leterojn, kaj la gelernantoj komunajn elbumojn por konatigi siajn urbojn, landojn, sin - mem per fotoj. Tiun jarfinan interŝangan vojaĝon ni preparis tiel, kiel niajn antaŭajn vojaĝojn inter francaj gelernantoj: unusemajna reciproka restado en la familioj de la korespondantoj, vizito en la regiono, en lokaj fabrikoj, komunaj kunvenoj, ludoj, dancoj kaj kantoj, raportoj, ktp...

La 23-an de junio, dek geknaboj dekkvaraĝaj elvenis en Fontaine-lès-Grès kun siaj du instruistoj, pertrajne el Kopenhago. Kune ĝis la monatfino ni vizitis la vilaĝon, la ĉirkaŭaĵojn, la trikotajfabrikon DD la proksiman urbon TROYES (mez-epokajn stratojn, interesajn preĝejojn, magazenojn, la unuan junularvilaĝon COPAINVILLE), la faman urbon REIMS kun katedralo, biskvitfabriko REM, la mondkonatajn ĉampanvinkelojn MOËT ET CHANDON, en EPERNAY. Dum vesperkunveno kun ĉiuj geesperantistoj kaj iliaj familioj, ni kantis, kaj dancis folklorajn dancojn, kaj S-ro Köhler prezentis diapozitivojn pri Kopenhago.

La unuan de julio, ok gejunuloj kiujn ni akompanis, foriris kun la

Danoj al Danlando. Trapasante Parizon ni vizitis Triumfarkon, Ejselturon kaj ŝipveturis sur la Sejno sub multaj pontoj. Kiom interesa estis tiu vojaĝo: trajnirado tra Belgio, Germanio, sur pramŝipo, tra Danlando sur "la plej longa ponto de Eŭropo", elveno en la ĉefurbon, kie la familioj kore akceptis nin.

Ĝis la oka de julio niaj kolegoj, S-roj Köhler kaj Christianssen proponis al ni tre interesan turisman programon: ni vizitis Kopenhagon, (urbodomo, lernejo, zoologia parko, haveno, la fama marvirineto, la Ronda Turo, magazenoj). Ni ĉeestis la deĵorŝanĝon de la reĝa gardantaro antaŭ la reĝa palaco, vizitis la bierfabrikon CARLSBERG, kaj amuziĝis en Tivoli sabatvespere. Ankoraŭ ni ekskursis ĝis Helsingör kaj Helsingborg

Dank'al la vivo en meztavolaj familioj (laboristoj, oficistoj, instruistoj), ni ekkonis la vivmanierojn de niaj danaj amikoj: precipe la nutraĵoj, litoj, malsimilas la niajn.

Dank'al Esperanto ni interkompreniĝis; dank'al la senpaga akcepto en la familioj, niaj gejunuloj elspezis nur la pertrajnan vojaĝkoston.

En oktobro, niaj vojaĝintoj prezentis siajn diapozitivojn, filmojn, pri siaj vojaĝoj kaj restado en Danio

Ni estas ege feliĉaj, ĉar niaj esperantistaj gelernantoj entuziasme laboris antaŭ, dum kaj post la vojaĝo. La plezuro de ĉiuj, la ĝojo de la restado, la emocio dum la disiĝo, la albumoj kun rakontoj, la fotoj restos neforgeseblajn memorizaĵojn por ĉiu.

Ges-roj Henriette k. Pierre FORT

INSTRUADO DE ESPERANTO EN LA LERNEJOJ - KLARIGO PRI DIVERSAJ ENKETOJ

La instruistoj ricevis, ricevas, aŭ ricevos diversajn alvokojn, kie oni petas, ke ili respondu al diversaj demandoj. Tio ne estas sadisma manio por turmenti la esperantistojn sed iom malorda zorgo por bone esplori la situacion. Kompreneble, estus pli bone, ke ĉiu instruisto plenigu nur unufoje ununuran respondilon, kaj ke tiu respondilo estu uzata de diversaj organismoj. Bedaŭrinde tiu kunligo, ĝis nun, ne okazis, kaj ricevinta diversajn plendojn, mi klarigos la kialon de ĉiuj tiuj demandaroj.

1) Demandaro de U. F. E.: Tiu demandaro sur violkolora papero estis sendita verŝajne de la sekretariato, al la grupoj. Ĝia celo estas precize sciigi en kiuj lernejoj Esperanto estas instruata. La respondo estas sendenda al S-ro TURIN 43 rue Emile Magnin (25) Pontarlier, kiel eble plej rapide.

2) Demandaro de S-ro Vincent: Ĝi aperis en Franca Esperantisto n°254, p.76: ĝia celo ne plu estas la lernejoj, sed la instruistoj. La estroj de U. F. E. aŭ G.E.E. dezirus scii, kiuj estas la instruistoj, kiu estas ilia lingva nivelo, ĉu ili akceptas gvidi kursojn, kaj ĉu ili dezirus perfektigi, aŭ pri lingva kono, aŭ pri pedagogio de la internacia lingvo. Oni tuj vidas, ke ne estas la sama demandaro.

3) Demandaro de UEA-ILEI: Tiuj du internaciaj asocioj komisiis S-ron Sonnabend enketi pri la lernejoj kie oni instruas la internacian lingvon. Tiu demandaro havas saman celon kiel tiu de U.F.E. kaj povus okazi tra la demandaro de S-ro Turin, sed, ĉar en la diversaj landoj povas ekzisti aŭ ne nacia enketo, oni juĝis necesa la internacian enketon. Kompreneble, la statistikoj de S-ro Turin devaskongrui kun tiuj de S-ro Sonnabend rilate al Francio; mi esperas ke la enketistoj kunlaboros por ordigi la aferon.

4) Mia demandaro pri provo kunligi kun la pedagogia instituto: la celo estas ankoraŭ malsimila: temas nek pri lernejoj aŭ instruistoj nombrindaj aŭ nombrendaj, sed pri propono por laboro laŭ difinitaj kondiĉoj. Mi konigos la kondiĉojn al la personoj, kiuj respondis al mi.

5) Enketo de UEA(CED) pri instruado en la universitatoj kaj altlernejoj. Tiam temas nur pri la universitatoj kaj pri oficialaj kursoj. La homoj, kiuj oficiale instruas Esperanton en Universitato aŭ simila Altlernejo, estas petataj, tuj doni sian adreson al la "CENTRO de ESPLORO kaj DOKUMENTADO", 77 Grasmere Avenue - WEMBLEY (Middlesex) Britujo.

Mi konfesas, ke tio estas multaj demandaroj, sed mi esperas, ke la legintoj komprenis la utilecon de ĉiu enketo. Multaj esperantistoj, kiuj ne sukcesas rikolti lernantojn por publikaj kursoj, diras: "La bona solvo estas deviga instruado de Esperanto en la lernejoj". Mi ne povas diri ĉu ni atingos aŭ ne tiun celon, sed mi estas certa ke, se ni ne estas kapablaj diri al la instancoj, kiuj povus decidi ion pri tio, nek kiu estas la nuna stato de la instruado (demandaroj (1) (3) (5)), nek kiuj instruistoj (kaj kiom) estas kapablaj tion fari (demandaro (2)), se oni ne proponas al ili la kontrolon de iu provo oficiala (demandaro (4)), tiam ne plu utilas paroli pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

F. BOYET

Le Générale Germana Blindul-Ligo de GDR eldonos Esperanto revuon en blindulpreso, kvaronjare, kies titolo estos AMIKECO. Oni sendu siajn mendojn senpere al la "Eldonejo de la Germana Centro-Librejo por Blinduloj, GDR.701-LEIFZIG, Gustav-Adolfstrato 7 - poŝtfako 245.

SCIENCA REVUO - Vol.19-a - n°2 (74),
===== 36 paĝoj - 14 x 20
Eldono de ISAE, trimonata. Jarabono:
10 F. pere de U.F.E.

Vortofteco, A.W.THOMSON (Britujo)

Statistikoj pri ofteco en la 4-a kolekto de Andersenaj Fabeloj (24 fabeloj, 66.084 vortoj), de unusilabaj vortoj, kaj de personaj aŭ geografiaj nomoj asimilitaj aŭ ne.

Internacia konferenco pri la kondiĉoj kaj eblecoj de scienca kunlaborado en Eŭropo - POPOVIC (Jugoslavio)

Raporto pri ne esperantofona internacia konferenco, kie Pr. POPOVIC kaptis taŭgan okazon interveni favore al internacia help-lingvo.

Sciencaj Revuoj en malgrandaj landoj B. POPOVIC (Jugoslavio)

Prelego en la ĉi-supra konferenco Pro la disdividiĝo de la scienco en multajn apartajn fakojn, la specialistoj pri unu fako ekzistas en malgrandaj landoj, en malgrandaj nombroj. Tamen por savi la originalecon de la lando, oni klopodegas publikigi nacilingvajn sciencajn revuojn, sed pro ke informo kaj dokumentado aperas ekskluzive en nur kelkaj mondlingvoj, multaj sciencaj artikoloj restas internacie nekonataj. Tiuoj cirkonstancoj kaj multaj aliaj, kiel ekzemple la alprenado en internaciaj konferencoj de nur grandaj laborlingvoj, kaŭzas tempoperdon lerni plurajn "laborlingvojn" por la anoj de la malgrandaj nacioj. Solvo estus, neŭtrala internacia help-lingvo, kiu cetera jam ekzistas kaj funkcias.

Ukrajna Sciencisto de la XV-a jarc.: JURIJ de Drohobyč - J. MATVIJISM - (Sovet-unio)

Helpe de Esperanto, la aŭtoro sukcesis preskaŭ tute rekonstrui la vivon de ukraina sciencisto, kiu profesoris en Universitatoj: astronomion en Bolonjo (1478-79), astro-

nomion en Feraro (1480-87), medicinon kaj astronomion en Krakovo (1488-1492) kiu fariĝis rektoro en Bolonjo, en Feraro, kaj reĝa kuracisto en Krakovo, ĝis li mortis en 1494, kaj estis eble la profesoro de Koperniko

Komparo inter EGM kaj U.V. - HAUPENTHAL (Germanujo)

La EGM-Worterbuch der internationalen Sprachen 1889, kaj U. V. el Fundamento (1905) montras pro la tre malmultaj malsamaĵoj inter ili, ke jam en 1889 la vorttrezoro de E° estis sufiĉe granda por ke ne ekestu leksikologiaj embarasoj.

Surteraj vivaĵoj ankoraŭ nekonataj - R.A.LEWIN (Usono)

La aŭtoro proponas apliki al biologio la saman sistemon, kiel tiu de la kemiistoj per la klasifo de MENDELEEV, t. e. esplori ĉiujn eblecojn por vivo, kaj speciale ĉiujn ĝis nun mankantajn, kaj konkludi pri ĉi lastaj: "ne trovotaj verŝajne ĉar malavantaĝaj de biologia vidpunkto, a ŭ ĝis nun ne trovitaj, sed verŝajne, trovotaj, kaj tiam serĉi".

Jacques MANCEAU

BIBLIA REVUO - N°3a (4a jaro) dumo -
===== nata 64 p. - 17 x 24-
Jarabono: 30 F. pere de U.F.E.

ĈEFA ENHAVO

Dio la saĝulo (B.COLLESS, Melburno) - Sistema komparo inter ideoj de la Egiptoj, Babilonanoj, Sumeroj kaj antikvaj Hebreoj.

En kiu jaro Jesuo naskiĝis? (G.RUST) (Southampton)

La aŭtoro levas tre skuigajn demandojn: HERODO la Granda jam mortis inter la 12a de marto kaj la 11a de aprilo (juda pasko), de la 4-a jaro ANTAUKRISTA! Li do ne povis ordoni infanmortigojn kvar jarojn poste!

PROKOPIUS diras, ke J.K. naskiĝis

dum la fermo pro AUGUSTO-ordono de la JANUSA templo. La imperiestro fermigis la templon nur en la jaroj antaŭkristaj 29a, 25a kaj 9a!

LUKO aludas al la tiama unua reĝado de QUIRINIUS (2.2.) super Sirio sed el pluraj fontoj, QUIRINIUS regis dum 6a-7a pK!

La prokonsulo 9-6 aK estis SATURNINUS. TERTILIANUS raportas, ke la registrado de la enloĝantoj okazis sub SATURNINUS, ĉar estis eksterkultime regi dufoje. Verŝajne LUKO konfuzis, sed tamen difektita ŝtono priskribas homon kiu kontraŭkultime estis dufoje prokonsulo de SIRIO sub AUGUSTO.

Per diversaj vojoj oni sciigis, ke registradoj en Egiptujo okazis ĉiun 14-an jaron, pro ke impoŝtoj estis pagendaj po viroj ekde la 14-jaraĝo. Oni trovis spurojn pri tio en la pK-jaroj 20,34,48,62; do la aludita registrado okazis, ĉu dum la 6a pK, ĉu dum la 9a pK.

Laŭ MATEO (2.19.), ili revenis al Egiptujo pro la morto de HERODO, kio konkludigis, ke la naskiĝo okazis iom antaŭ la 4-a aK.

Pri MAGA astro, povus esti NOVA: laŭ ĉiuj astronomoj en marto aK. kaj aprilo 4 aK.

Laŭ KOMETO: tiu de HALLEY en 11 aK aŭ KONJUNKCIO de Jupitero kaj Saturno en 7a aK, kaj plue en Marso, 6a aK...

Nova vidpunkto pri la verkado de komentarioj pri la sinoptikaj evangelioj - E.C.HOBBS (San Francisko)

Generale, oni studas la sinoptikajn evangeliojn de historia vidpunkto per interkomparoj. La aŭtoro rimarkigas ke ĝis nun neglektita estas la devo serĉi la celon de ĉiu aparta Evangelisto; kial li tiel verkis sian verkon kaj ne alimaniere: "Eĉ kiam li raportas saman aferon, ne ĉiam ili havas la saman celon". "Nia tasko estas komenti pri tio, kion ili celis".

La elfosaĵoj sur monto Gerizim: P.G. LOMBARDI O.F.M. (Jerusalemo):

Per antikvaj priskriboj kaj ĉefe per tiutempaj moneroj de la urbo Flavia Neapolis (nuntempe NAPLUSO), la aŭtoro identigis la ĉi-tieajn ruinaĵojn, kiel tiujn de templo de Zeŭso Hupsistosa (konstruita de HADRIANO), Samarian templon, kiu postnomiĝis Zeŭsa Heleniose, kaj ankoraŭ poste Zeŭsa Ksemiose.

...kaj la kutimaj recenzoj pri fakaj libroj kaj revuoj:

Speciale interesaj estas tiuj pri EVIL studoj, kiuj tuŝas la demandon de la malbono en mitologio.

Ankaŭ tre interesa estas SATAN en la Malnova Testamento de R.S.KLUGER, kie la aŭtoro montras interalie, ke SATAN, origine ne estis PROPRA nomo, sed substantivo signifanta "malhel-panto", sed kiel estaĵo tute ne demono. Dio estis, en la origina religio, ambivalenta, senmorala nur poste, sub influo de ZARATUŜTRA, oni distingis inter la anĝelo de DIO: la luma flanko de DIO, kaj la satano de DIO, la malfavora flanko de Dio.

Jacques MANCEAU
=====

LA MEVO - 10/68 - Ornitologia revuo,
===== duonjara - Jarabono: 3 F.-
pere de U.F.E.

Observoj pri formikoj, apusoj, mevoj, dompaseroj (J. F. FOQUET), kaj Birdprotektado en Sovet-unio (BOSSONG)

J. M.
=====

oo

ĈU VI JAM REPAGIS VIAN KOTIZON?

ĈU VI JAM PAGIS VIAJN REABONOJN ?

HELPU NIN PAGANTE FRUE !

RECENZO

CIGANA ROMANCARO, de F. G. Lorca, en
===== traduko de K.GUSEV
eldonita en Sovet-Unio.

Ricevinte du ekzemplerojn de tiu verko, ni sendis unu el ili al nia amiko ALVARO DE ORRIOLS, specialisto pri tiu hispana verkisto.

Anstataŭ recenzon, ni ricevis de S-ro de Orriols la jenan tekston kiun li petis ke ni publikigu en nia revuo:

"Kiel nura rajtigita tradukinto por esperantigo de la poemoj de F.G. Lorca, mi proponis ilian publikigon al la eldonisto S-ro REGULO en 1961, sub la titolo "Cigana Romancaro".

S-ro Regulo proponis al mi la kunlaboron de K.GUSEV (kiun) mi tute ne volis akcepti.... unue ĉar mi estis la nura tradukinto rajtigita kaj mia laboro estis jam finita, due ĉar en tradukaĵoj de Gusev, sendita al mi de la eldonisto, mi trovis tiom da eraroj, ke ĉia nenecesa kunlaboro vidiĝis nebla. (Post) mia rifuzo la eldonisto decidis delasi la aferon. Rezulto de tio estis aliaj malfacilaĵoj, kiuj malebligis aliloke la publikigon de la Lorca-poemaro. Ĉiaokaze, por kompensi tion, mi publikigis plurejn poemojn el mia traduko en diversaj esperantaj revuoj, ĉiam kun ĝenerala aprobo, kaj ĉiam kiel NURA RAJTIGITA TRADUKINTO.

En la traduko de GUSEV, tiu "grava detalo" estas tute forgesita!

Koncerne la verkon mem, mi povas certifi, kiel hispana poeto kiu mi estas, ke lia traduko -pro nekompleta scipovo de nia nacia lingvo- entenas tre gravajn absurdaĵojn. Plurfoje li konfuzigas la sencon de la vortoj. Ekz: la hispana vorto "araña"

Helsingør

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj

de la venonta somero okazos
20.-26. de julio en La internacia
Altlernejo de Helsingör.

Venu por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo.

Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,

Ingemannsvej 9,

DK - 8230 Åbyhøj

Danlando.

NB. Speciala karavano el Helsingör al UK en Helsinko estos aranĝata. Ekiro 26/7 matene, alveno al Helsinko tagmeze.

signifas "araneo", sed ankaŭ "pendanta lampo" aŭ "lustro". Do, en la poemo "La monaĥino cigana", li diras ke "la sep birdoj de l'prismo flugas en la araneaĵo" anstataŭ diri ke "la sep birdoj de l'prismo (la sep koloroj) flugas en (la supozeblaj kristalpendaĵoj) de la lampo!"

Krome, S-ro Gusev tradukas "gato garduño" (kato ruza, rabema) per malsama besto: la afrika "histriko". Ankaŭ li donas sabrojn al la ciganoj, metas amarajn merojn en la lunon kaj en la poemo "Sankta Gabrielo" el bela knabo junksimila, li faras "belegan filmo de kano!"

Por bone traduki la super-realistman stilon de Lorca kaj kompreni ĝiajn simbolajn imagojn, ne sufiĉas posedi surfacan konon de la lingvo: estas ankaŭ necese koni la profundaĵojn de la lingva animo!

Eĉ en tiaj ne ĉiam eblaj cirkonstancoj, la traduko ne estas plejofte tre facila."

ALVARO DE ORRIOLS

=====